EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 22> ● AMO 85 ● Goma ● Semado ● BET● 30 horoj italaj ● < apr 9.**

# AMO 85 pri spaco kaj scienco

La seminarion malfermis la patro de AMO, Stefan MacGill, kaj tuj post la malfermo li prezentis sian enkondukon pri la sorto de ISAE, la plej malnova Faka Asocio de UEA, fondita en 1906, sed en urĝa bezono de renovigo. Helpantoj kaj kunlaborantoj ege bezonataj! Ni alkroĉas la prezentaĵon.Temas pri la unua AMO-seminario en Israelo, kadre de ilia landa kongreso.

Jen priskibo de la komenco de la prelego de d-ro Amri Wandel: 'Dum sia 30-jara funkciado la teleskopo *Hubble* atingis mirindajn bildojn kaj rezultojn, multe pli ol ajna alia teleskopo, sur la Tero aŭ en la spaco. Oni vidis la plej elstarajn bildojn de *Hubble*: pri planedoj kaj satelitoj en nia sunsistemo ĝis pra-galaksioj frueen la juna universo.
La nova spacteleskopo *James Webb* (JWST) kiu observos eĉ pli for, ĝis la unuaj galaksioj kiuj aperis nur 300 milionojn da jaroj post la praeksplodo. Kontraŭe al *Hubble*, kiu orbitas la Teron je alteco de ĉirkaŭ 600 km, JWST orbitas la sunon 1,5 milionojn da km for de la Tero. Centoble pli potenca ol *Hubble, James Webb* povos realigi senprecedencajn observojn, kiuj ĝis nun estis ekster la atingo de la homaro, kiel apero de la unuaj steloj en la universo kaj serĉo de vivsignoj en eksterplanedoj.'



La tria prelego venis ankaŭ de Amri, ĉi-foje pri movada temo: la multjara rolo de AIS kaj ĝia ligo kun la Internacia Kongresa Universitato (IKU). IKU, kiu en la lastaj jardekoj fariĝis unu el la plej popularaj kaj prestiĝaj programeroj de la Universala Kongreso, unuafoje okazis en 1925 kiel la Internacia Somera Universitato. En 1981, okaze de la unua sud-hemisfera UK, la nomo estis modifita al Internacia *Kongresa* Universitato. En Montrealo 2022 realiĝos la **75-a IKU**-sesio. Alia "ronda" datreveno kiun IKU festas ĉi-jare, estas la **25-jariĝo de la IKU-libro**, ĉar en 1997 aperis en la UK en Adelaido modesta kajero, hirundo de la longa serio de IKU-libroj.

EKO esperas porti al vi per estontaj komunikoj pli da materialoj el AMO 84 kaj 85.

# Goma – abelujo de aktiveco en Kongo DR

La grupo KJBEL ricevas homojn de malsamaj talentoj, triboj, aĝoj, scioniveloj ktp. Ĉiuj KJBEL-anoj uzas sian talenton por la bono (propagando) de nia kara lingvo "ESPERANTO". En la grupo KJBEL, oni ludas filmetojn kaj filmojn, oni verkas rakontojn, historiojn, poemojn, novelojn), ni havas desegnistojn, dancantojn kaj plion.




Grupe kaj memume (per*'selfie'*) en Goma



# Argentina kaj itala kursoj

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

Nomo: Baza kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Ricardo Coutinho Rodrigues
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Bonaero, Argentino.
Aldoninto: ricardocoutinho

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27410

Nomo: reta kurso
Gvidantonomo: Gianantonio Pfleger
Tipo: Nova movada kurso
Lando: Italujo, en pluraj urboj.
Aldoninto: Ruĝanubo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27411

# La projekto 'Ni semas' ekportas modestajn fruktojn

La asocio COPROFER starigis peton, prezentitan merkredon la 23-an de marto, kaj estas respondita duonfavore marde la 29-an de marto 2022. La subteno venis kadre de la projekto "Instruado de Esperanto kaj ĝia disvastigo " de nia asocio, realigota sine de nia Eo-klubo. Tiu ĉi projekto celas antaŭenigi Esperanton en orienta Kongo, precipe en Bukavu kaj ĝi kontribuos al la celoj de UEA pliigante la nombron de Eo-interesuloj kaj farante Esperanton senlima lingvo. La kosto de ĉi tiu nia projekto estas 120 € kaj la projekto devas komenciĝi en aprilo kaj daŭriĝis septembro de la kuranta jaro. La realigado de la projekto konsistos el luo de trejnejo, kreo de banderolo, aĉeto de kretoj kaj organizo de konkurso por esperantistoj en Bukavu. La

ricevita subteno estas 50 eŭroj. Ĝi garantias al ni 3- monatan lupagon, ĉar ni pagas la trejnejon po 15 dolaroj monate.

## BET 56 bele arigas la homojn

Jam 181 personoj el 25 landoj aliĝis al la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos 9-17 julio 2022 en la havenurbo Klajpedo (Litovio). Vidu la laŭlandan aliĝtabelon en La Ondo de Esperanto https://sezonoj.ru/2022/03/bet-123/

Vidu ankaŭ https://sezonoj.ru/2022/03/bet-122/ pri uu prelego.

## Ondo de pacemo

Ni estas kontraŭ milito kaj naciismo, ni estas por paco", — skribis Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov en la redakcia artikolo de la marta eldono de *La Ondo de Esperanto,* kiu aperis la 29an de marto. Legu la artikolon en nia novaĵretejo https://sezonoj.ru/2022/03/ondo-94/

## Muziko por vi

Jen "Duono" de Tantsy Minus en Esperanto, Kantas Evelina Sokolova, gitarludas Jan Karapetjan.

https://www.youtube.com/watch?v=ZDqBnCIBow0

## Itala projekto por instruistoj

Pludaŭras la projekto www.30oredoro.it por italaj instruistoj, kiu estas la kurso por prepari la instruistojn instrui en siaj klasoj. Estas reta kurso (ni havas 10 lecionojn, entute 20 horojn). Kvindeko da homoj aliĝis kaj nun ni atingis la lecionon 7, sed oni povas aliĝi kiam oni volas, do kelkaj instruistoj estas nun ekkomencantaj. La projekto estas de Itala Instituto de Eperanto kaj la itala sekcio de ILEI.

prof. laura brazzabeni, +39 3286461063 (ankaŭ *whatsapp*)
direttore generale IIE, www.esperanto.it

# EKO: JEN NUMERO 22 POR '22!

========= vortoj: 790 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.